

& Versoj slovakaj:

< Rekante 14 el 23 batoj por strofo, entute 368 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Peter Benický. El slovakaj tradukis Pavel Rosa (Slovakaj antologio, 1977). Baladigis Martin Strid per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:23> (

/mimi mimi fami; soso sofa mimi; mimi redore mimi;

(# Rekantaĵe: mire doTi LaLa; mi mimi fami; so sofa mimi; mimi redore mimi; mire doTi La La)

)×16)+

(& Strofoj:

,&1:

'1 Vi evitu tenton ; oron kaj arĝenton ;
de riĉulo laŭdegi,

(×: **Lin atingos morto. ; Kreskas la herboj, ; plenos la korboj, ; fina jen estas vorto: ; Nin atingos morto.**)

'2 ĉar nur magazenas, ; sed ne
suverenas ; varon multaj vendistoj.

'3 Ledojn prilaboras, ; sed viandon
voras ; alia - ne ŝuisto.

'4 Laŭdu pro saĝeco, ; virto, sperto,
deco ; Salomonon saĝegan.

,&2:

'5 Kio pli agrabla, kio pli kapabla ;
estas ol libereco?

'6 Kien vi deziras, ; tien tuj vi iras ; kun
kuraĝo sen timo.

'7 Estron vi ne havas, ; vi mem por vi
pravas, ; vin neniu ĉikanas,

'8 nek al vi ordoni, ; nek laboron doni ;
rajtas iu fremdulo.

,&3:

'9 Li birdbilde vivas, ; kankron ne
similas, ; ĝuegas liberecon,

'10 li ja ne servutas, ; nek ion tributas, ;
ĉien laŭplaĉe iras.

'11 Por li la karcero ; ne estas afero, ;
miu kaŭzas timegon,

'12 ĉar mastrosinjoro ; en troa rigoro ;
nur servutulojn punas.

,&4:

'13 Ĉe tablo de reĝo ; estas kvazaŭ
leĝo, ; ke tri aĵoj superas:

'14 servileca flato, ; frenezplena stato, ;
multaj plenaj pokaloj.

'15 Flatulo flatanta, ; frenezulo vanta ;
prenas multajn donacojn,

'16 ke eĉ veturilo ; ne estas facile ; ilin
foren transporti.)